nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2020

## PLANOJ DUM KAJ POST LA PANDEMIO

La evoluo de la pandemia situacio, bonŝance pliboniĝanta en la momento de redaktado de tiu ĉi bulteno, kompreneble plu influas la Esperanto-agadon, kaj la necerteco pri la estontaj planoj ne ebligas nun klarajn konkretigojn pri ĉeestaj renkontoj.

Se aferoj plu bone evoluas, oni esperas malfermi la HEF-sidejon jam la 8an de junio, kaze de bezono por aranĝi iujn demarŝojn. Certe ne eblos amasaj renkontoj, kaj ni devos sekvi sekurajn protokolojn, do bv. unue anonci vin, por certi ke la sidejo estos malfermita kaj kalkuli la maksimuman nombron da ĉeestontoj.

Depende de la evoluo de la fazoj por liberiĝo de la pandemio en madrida regiono, oni studos la eblecon kunvoki iun malgrandan rondon en malferma spaco, kiel parko aŭ simile, en venontaj semajnoj. Tamen, denove ni devos tre atenti la evoluon de la situacio kaj la rekomendojn por sekureco, do ni ankoraŭ ne povas diskonigi detalojn. Bv. atenti la kutimajn forumojn por informiĝi (vidu sube la koncernajn retadresojn).

HEF konfirmis ke oni plu konservas la planojn okazigi la hispanan kongreson en Comillas en oktobro, se la evoluo de la malsano tion permesas, konsiderante ke la situacio en Kantabrio estas relative pli bona kompare al Madrido kaj aliaj regionoj. Rezervu la datojn de la 9a ĝis la 12a de oktobro por vojaĝi al Comillas kaj ĝui la unuan postsomeran E-renkonton.

Dume, konkretiĝas la planoj pri virtualaj renkontoj dum la somero. Unu estas aparte menci-inda pro la ĉefrolo de madridano: Miguel Fernández estos speciala gasto de la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco (VEKI) kiun ILEI organizos de la 25a ĝis la 31a de julio 2020, anstataŭe de sia planita kongreso. Bv noti la datojn kaj atenti la plu anoncotan programon.

## DATREVENO KUN NOVA LIBRO

Miguel estis ankaŭ ĉefrolulo en majo pro du kialoj: la 18an de majo li fariĝis 70-jara, kaj tiu-okaze la retportalo *Sezonoj* dediĉis al li artikolon: https://sezonoj.ru/2020/05/fernandez/.

Krome, aperis lia unua poemaro en la hispana: la antologio de poemoj el ĉiuj liaj libroj, tradukitaj en tiun ĉi lingvon. La titolo estas *Semilla de arrebol* (Semo de matenruĝoj) kaj ĝi estis ĵus eldonita de la baleara eldonejo *Calumnia*, en kies retejo eblas ĝin mendi jam en tiu ĉi momento: http://calumnia-edicions.net/product/semilla-de-arrebol-miguel-fernandez.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por informiĝi pri daŭraj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com